Malmö, 25/5 1948.

Al

Brita Esperantista Asocio
140, Holland Park Avenue
L o n d o n W 11
Anglujo.

Pri ŝanĝoj en la statuto de UEA.

Tre estimataj samideanoj!

Sveda Esperanto-Federacio ricevis la rezolucion, kiun akceptis la estraro de BEA pri la temo ĉisupre.

La estraro de SEF zorge tralegis vian rezolucion, kaj la sveda federacio nun deziras voĉdoni novan tekston por la artikolo 10:

" Kiel Individua Membro povas esti akceptata ĉiu honorinda persono, kiu respektas la principon de artikolo 4."

Ni do akceptis la unuan parton de la koncerna artikolo kaj aldonis novan frazon " .... , kiu respektas ktp ".

Ni insiste petas, ke la brita movado subtenu la nun proponitan tekston, kaj ke vi informu ĉiujn landajn asociojn, al kiuj vi jam skribis pri la demando, pri tiu ĉi nova propono.

Kun samideanaj salutoj
via

SVEDA ESPERANTO-FEDERACIO

Jan Strönne
prezidanto.